FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 2 | Aprilo/Junio 2007



Schweriner Schloss Foto: Karl Bernhard



Herstellung und Montage einer Erinnerungstafel am Bahnhof Herzberg am Harz, der Esperantostadt, zur Erinnerung an Joachim Gießner

Sehr geehrte Freunde und Bekannte von Joachim Gießner.
Zur Erinnerung an den bekannten, langjährigen GEFA- und IFEF-Präsidenten, Joachim Gießner, Träger des Bundesverdienstkreuzes und verdienstvoller Bürger der Stadt Herzberg am Harz, die Esperantostadt, möchten der Rat der Stadt Herzberg und wir, am Bahnhof in Herzberg eine Erinnerungstafel anbringen.
Joachim Gießner, der unvergessliche, in vielen Ländern bekannte und beliebte, langjährige Präsident der „Deutschen Eisenbahner Esperanto-Vereinigung (GEFA)" und der „Internationalen Eisenbahner Esperanto-Föderation (IFEF)", lebte und arbeitete 40 Jahre bis zu seinem Tod in dieser Stadt, die sich heute Esperantostadt nennt. 12 Jahre, bis zu seiner Pensionierung, war er hier Bahnhofsvorsteher. Er kämpfte rastlos mit Hilfe von Esperanto für die gegenseitige Verständigung von Menschen aus verschiedenen Ländern. Unvorstellbare 46 Jahre führte Joachim Gießner als Präsident die „Deutsche Eisenbahner Esperanto-Vereinigung" und hatte das Vertrauen der „Stiftung Bahn-Sozialwerk" als Hauptbeauftragter für Esperanto.
Seine Übersetzungen in Esperanto sind Legende. Außer Übersetzungen von Eisenbahnvorschriften machten ihn die Übersetzungen von unzähligen Arien aus Oper und Operette und von Volksliedern unsterblich. Ein Meisterwerk war die Übersetzung des Buches „Die letzten Kinder von Schewenborn" von Gudrun Pausewang, das sogar aus Esperanto ins Chinesische übersetzt wurde. Es würde den Rahmen dieses Briefes sprengen, wenn wir alle seine Verdienste hier aufzählen würden.
Alles kostet Geld, so auch die Erinnerungstafel. Wir, die Joachim Gießner kannten und verehrten, rechnen es uns als Ehre an, einen kleinen Obolus zu den unvermeidlichen Kosten beizutragen. Jede Zuwendung wird dringend benötigt.
Für Ihren Beitrag sagen wir im Voraus herzlichen Dank.

Mit freundlichen Grüßen
i.A. Rolf Terjung gez. Achim Meinel, GEFA-Präsident

Konto: Rolf Terjung, Konto-Nr. 200316463, BLZ 36060591 bei der Sparda-Bank West, Zahlungsziel: „Memortabulo"
Aus Euro-Ländern: IBAN: DE18 3606 0591 0000 3164 63
BIC : GENODED1SPE

Schwerin, die Hauptstadt von Mecklenburg-Vorpommern, war die ideale Stadt des diesjährigen GEFA-Seniorentreffens.

In diesem Jahr war Mitteldeutschland an der Reihe, nachdem wir uns im vergangenen Jahr im Westen, in Königswinter, getroffen haben. Logischerweise ist 2008 der Süden an der Reihe.

Nun zu Schwerin: Im Internet fanden wir ein kleines, gemütliches Familienhotel, 200 m vom Hauptbahnhof entfernt, dessen Wirt sogar bis vor einigen Jahren für die Stiftung BSW gearbeitet hat. Und welch ein Zufall: Das Fremdenverkehrsbüro der Stadt, (heute heißt das „Marketing"), bot unter vielen anderen Sprachen, auch eine Stadtführung in Esperanto an.

Die Führung durch die Stadt, in Esperanto, dauerte zwei Stunden, was für einige doch etwas beschwerlich war. Dafür erfuhren wir manches aus der Geschichte der Stadt und sahen viele, nach der Wende liebevoll renovierte, historische Gebäude. Das Schweriner Schloss, in dem auch der Landtag tagt, ist etwas außergewöhnlich Sehenswertes und wurde zum größten Teil schon für die Bundesgartenschau, die 2009 in Schwerin stattfindet, renoviert. Es ähnelt etwas dem Schloss Neuschwanstein in Bayern. Ein Besuch der Bundesgartenschau wird sich dann bestimmt lohnen.

Unsere Stadtführung endete in der „Alten Mecklenburger Gaststätte". Hier saßen wir nach dem Abendessen noch einige Stunden mit Schweriner Esperantisten zusammen. Als kleines Programm zeigte ich, begleitet mit launigen Worten, Dias vom IFEF-Kongress in Shanghai.

Unser Programm endete am Donnerstagmorgen mit der Besichtigung des Schlossmuseums.

Bis zum nächsten Mal im Süden.

Rolf Terjung



Teilnehmer bei der Stadtführung Foto: Karl Bernhard

Artikolo de AMik el Monato:

„Solvo ne tute ortodoksa"

Judismo malpermesas uzi elektron sabate kaj festotage. Ortodoksaj judoj solvas tiun problemon, uzante ekzemple aŭtomatan horloĝon, kiu mem en- kaj elŝaltas elektron dum tiuj tagoj. Tamen la plej ortodoksaj loĝantoj en la jerusalema kvartalo Mea Ŝearim preferas neniel uzi elektron.

Nun ŝajne la problemo estas solvita. Loĝantoj de la ortodoksa kvartalo produktas tiel nomatan koŝeran elektron per generatoro, kiun enŝaltas arabo. La koŝera generatoro provizas sabate ĉirkaŭ 500 familiojn kaj sinagogon per elektro.

Deŝiri tualetpaperon de la rulo post la necesa, natura ago ankaŭ estas malpermesita laboro dum tiuj tagoj. Tial ortodoksaj judoj deŝiras tagon antaŭe konvenan kvanton.

Multaj faroj de judoj ŝajnas esti strangaj. Sed kiom el niaj faroj estas strangaj? Nur ni ne rimarkas tion.



La *Luxemburger Eisenbahn*

Fine de la jaro 2006 la *Luxemburger Eisenbahn* festis sian 50-jaran datrevenon de la elektrizado.

Ĉio komencis en oktobro 1949, kiam la iama transportministro *Viktor Bodson* komisiis fari studon pri elektrizado de la fervojreto kiel alternativo al la vaportrakcio. Tiu studo estis prezentata la 5-an de aprilo 1950 kaj estiĝis teoria fundamento pri la elektrizado en *Luxemburg*.

Tiu ellaborita skizo antaŭvidis unue la elektrizadon de la industria ĉeffervoja linio de *Rodange* al *Wasserbillig* trans *Esch-Bettemburg-Syren-Oetrange* kiel interliga fervojlinio inter Francujo kaj Germanujo. Sed spite de tio unue estis elektrizata la transit-fervoja linio *Leinbettingen-Luxemburg-Bettemburg* por prezenti al la *Montan*-industrio potenckapablan nord-sud-akson de *Antwerpen* trans *Luxemburg* al *Basel* kaj Italujo.

Dum la inaŭguro, kiu okazis je la 29-a de septembro 1956, ĉeestis ankaŭ la granddukino *Charlotte.*

La trakcio de la trajnoj okazis per lokomotivoj, same kiel en Francio, per tensio de 25000 voltoj. Iom post iom ankaŭ la aliaj fervojlinioj en *Luxemburg* estis elektrizataj.

Nur je la 10-a de septembro 1993 finiĝis la elektrizado per elektrizado de la ferfojlinio *Kautenbach – Troisvierges.* Nun la tuta fervojreto de *Luxemburg* estas elektrizita
.

Esperanta kolokvo pri planlingvaj bibliotekoj en la Austria Nacia Biblioteko dum oktobro 2007 en Vieno

Vieno, aprilo 2007

Nia planlingva spirita heredaĵo estas konservata en bibliotekoj kaj arkivoj. Ĉi-rilate bedaŭrinde ekzistas multaj problemoj, tro ofte nekonsciataj. Pro tio la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, aranĝos kun la subteno de UEA internacian kolokvon en Esperanto je la temo

"Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj".

La kolokvo okazos la 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 sub teknike bonaj kondiĉoj en la nova sidejo de la Esperantomuzeo, Palais Mollard, Herrengasse 9, A-1010 Vieno.

La celo de la kolokvo estas prezenti la ĉefajn problemojn, kiujn frontas diverstipaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj kaj kiuj estas solvendaj. Jen la enhavo de la antaŭvidita programo:

- prezento de la aktuala situacio de Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj
- informoj pri gravaj bibliotekoj kaj arkivoj
- utiligo kaj diskonigo de la riĉaĵoj de la kolektoj
- problemoj de la modernigo de la kolektoj, i.a. per la utiligo de novaj teknologioj

La reciproka konatiĝo de la koncernaj respondeculoj, la komuna pridiskuto de la nuntempa rolo de niaj bibliotekoj kaj arkivoj, helpu al ni trovi konvenajn vojojn kaj metodojn por starigi kunlaboron kaj interhelpon.

Programskemo:

19-a de oktobro: Malfermo (9h00), faka programo, komuna vespero

20-a de oktobro: Daŭrigo de la faka programo ĝis vespero

Kotizo: 45 €, reduktite 30 €

Pliaj informoj ĉe: esperanto@onb.ac.at



La nova librostokejo de la "Kolekto por Planlingvoj"
foto: Kathrin Delhougne



Jam mil Esperanto-fotoj en „Bildarchiv Austria“

La Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko lanĉis kunlaboron kun la „Bildarchiv Austria“ kaj komencis katalogigi kaj skani siajn 30.000 fotojn kaj 10.000 aliajn objektojn kun Esperanta temo. Ĵus eniris tiun daten-bankon la mila foto, la unuaj objektoj sekvos en la venontaj semajnoj.

Kion tio signifas? Tio signifas, ke ekde nun tiuj skanaĵoj estas alireblaj kaj videblaj en interreto. En la sekvaj jaroj enlaboriĝos ĉiuj fotoj, aliaj bildobjektoj kaj Esperantaĵoj en la posedo de la Esperantomuzeo: desegnoj, pentraĵoj, afiŝoj, poŝtkartoj, bildkartoj, poŝtmarkoj, insignoj, steloj, ŝildoj kun Esperanta surskribo...

Tiel la mondskale plej granda arkivo kun Esperanto-bildoj kaj -objektoj estas je la dispono de ĉiuj. Eblas ankaŭ deŝuti la skanaĵojn – tute senkoste en meza kvalito kaj kun ioma krompago en altega kvalito. Tio estas granda oferto ne nur por la diversaj Esperanto-revuoj, kiuj serĉas historiajn bildojn, sed ankaŭ por sciencistoj, kolektantoj kaj la simpla samideano.

La priskriba lingvo de la “Bildarchiv Austria” estas la germana. Eblas serĉi per la vorto *“Esperanto”* kaj aldona vorto: Ekzemple per la serĉvortoj *“Esperanto”* kaj *“Wien”* vi ricevas bildojn de Esperanto-okazaĵoj en Vieno. Aranĝojn oni povas trovi ankaŭ laŭ la Esperanta nomo: *“universala”* ekz. kondukos vin al ĉiuj fotoj de la Universalaj Kongresoj.

La “Bildarchiv Austria” organizas ankaŭ malgrandajn virtualajn ekspoziciojn. Ĵus enretiĝis la unua: **“Esperanto zwischen 1918 und 1938”** (Esperanto inter 1918 kaj 1938) kun kompreneble emfazo de Aŭstrio. Pro la fakto ke “Bildarchiv Austria” estas unu el la plej grandaj bild-daten-bankoj en Eŭropo, tiuj ekspozicioj pri Esperanto havos ankaŭ tre gravan varban efikon.

Alvoko: Gesamideanoj, garantiu, ke viaj historiaj Esperanto-fotoj kaj -dokumentoj ne perdiĝu! Sendu ilin al la Esperantomuzeo, kiu dece kaj konvene konservos ilin por futuraj generacioj.

Jen la adreso:
Esperantomuzeo,
Nationalbibliothek
Postfach 308
A-1015 WIEN / Vieno

La retadreso de “Bildarchiv Austria”:
http://www.bildarchivaustria.at/default.aspx
La retadreso de la Esperantomuzeo:
http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm

Willi Schmid aus Leutkirch lässt sich vorlesen.

Er ist 1928 geboren, kam 1943 als Junghelfer zur Bahn und absolvierte später die bautechnische Assistenten-Laufbahn. Mit Esperanto machte er schon 1950 Bekanntschaft und absolvierte einen Briefkurs. Den Eisenbahner-Esperantisten hält er schon seit Jahrzehnten die Treue. 1988 war es Zeit für den Ruhestand, aber auch Beginn einer Sehschwäche, die inzwischen zur Erblindung führte. 2004 starb seine Frau und vor einem Jahr zog er ins betreute Wohnen. Aber alles das ist kein Grund für ihn, die Mitgliedschaft bei GEFA zu kündigen. Er besitzt inzwischen ein Vorlesegerät (4000 €, davon 60% KVB-Anteil) und kann sich unsere Mitteilungen in Esperanto vorlesen lassen!



La esperantisto Joseph R. Scherer (1901-1967) en sia "loĝ-aŭtomobilo" per kiu li veturis tra la tuta mondo (1934)
(bildo: Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj Vieno)

Schon angemeldet?

51. Jahresversammlung 26. bis 28. Oktober 2007 in Bad Elster

Unsere Jahresversammlung findet in diesem Jahr in Bad Elster, dem traditionsreichsten Kur- und Heilbad Sachsens, statt. Es erwartet Sie ein anspruchsvolles, kulturelles und auch ein schönes touristisches Programm. Eine Teilnahme lohnt sich also.
Auskunft und Anmeldungen für die GEFA-Jahresversammlung:
Achim Meinel, Bachstelzenstr. 5, 14612 Falkensee – Telefon (0 33 22) 42 58 88
Die Einladung, das Programm und die Anmeldung finden Sie in Nummer 1/2007 des „Fervoja Esperantisto".



Kalendaro

13.-29.7.2007 SOMERE – Somera renkontiĝo en Wildenburg/Eifel.
www.esperantoland.de
21.-28.07.2007 18a Ekumena Esperanto-Kongreso, 60a Kongreso de IKUE kaj 57a Kongreso de KELI en Pelplin, Pollando
www.Bernhard-Eichkorn.de aŭ esperanto@powiat.malbork.pl
21.-28.07.2007 80a SAT-Kongreso en Parizo, vinkomarkov@yahoo.fr
28.7.-4.8.2007 7a EEU-Kongreso (Eŭropa Esperanto-Union) en Maribor
www.esperanto-maribor.si
4.-11.08.2007 92a UK (Universala Kongreso de Esperanto) en Jokohamo, Japanujo
www.uea.org aŭ uea@inter.nl.net

Redaktfino por FE 3/2007 estos la 15.08.2007
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: fr.lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361